



Internacia  
Informservo

kun ilustrita  
kongresraporto  
pri Paderborn

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 29/77 - 22 jul 1977  
Aperas ĉiusemajne

kaj ampleksa rubriko  
"Esperanto en Radio"

Esperanto en radio

Nürnberg (pp) - Pro aktualaj kaŭzoj ni volas ĉi-foje trakti la problemon "Esperanto en Radio" pli detale kaj komenci sur la titola paĝo.

Post la ampleksa analizo fare de d-ro Antonio De Salvo de Radio Roma, el kiu ni citis en n-ro 28/77, nun ankaŭ Svisa Kurtonda Radio en siaj elsendoj de la 18-a, 19-a kaj 21-a de julio okupis sin pri la temo.

D-ro Arthur Baur prelegis pri "Radio-Revuo en Esperanto". Ni ĉisekve publikigas la tekston de la prelego:

"La eldonisto de la Eŭropa Esperanto-Revuo, Ludwig Pickel en Nürnberg, Germanujo, publikigas ankaŭ Internacian Informservon, kiu havas la titolon Pilo-Press. Tiu servo, kiu plenigas senteban truon en nia informado, havas ankaŭ la meriton, ke ĝi regule kaj rapide informas pri la radio-elsendoj en Esperanto, ne nur pri la elsendotempoj, sed ankaŭ pri la enhavo de la programoj. Tio ne nur estas valora por la aŭskultantoj, kiuj povas informiĝi pri la programoj, kiujn ili maltrafis, sed ankaŭ por la stacioj kiuj tiamaniere trovas eĥon, kaj tian oni ja ne havas tro.

En la lasta tempo la Informservo malfermis debaton pri la eldono de Internacia Radio-Revuo. Sinjoro Pickel eĉ jam donas specimemon, ĉar unufoje li publikigis kvarpaĝan bultenon kun la titolo "Esperanto en Radio" prezentante eltiraĵojn el la programoj de la diversaj stacioj uzantaj Esperanton, ankaŭ de la nia. Li samtempe submetas al la publiko jenajn du demandojn: ĉu speciala konstanta rubriko en Eŭropa Esperanto-Revuo povus provizore realigi la ideon de radio-revuo kaj due ĉu la legantoj kaj aŭskultantoj akceptas politikajn tekstojn tiajn kiaj aperas en ĉi tiu bulteno?

La unuan demandon mi povas jesi, pri la dua devas decidi la publiko. Mi tamen volas aldoni kelkajn pensojn pri radio-revuo kaj la Esperanto-gazetaro ĝenerale, al kiuj mi sentas min legitimita kiel profesia ĵurnalisto kaj iama longtempa redaktoro ankaŭ de la svisa nacia Esperanto-organo, kiu sisteme nomiĝis Svisa Espera kaj nun Svisa Esperanto-Revuo. Ĉi jam havas la respektindan aĝon de 74 jaroj.

Principe la regula publikigo de Radio-Revuo en Esperanto certe estus bona afero, kaj mi tute samopinius kun mia kolego Pettyn de la Pola Radio, kiu nomas tiun eldonon oportuna. Kaj mi ankaŭ samopinius kun nia amiko d-ro Kondor en Germanujo, kiu nomas la ideon bonega kaj centprocente subteninda. Tamen mi opinias ke la celo de tia revuo ne devus esti publikigi la tekstojn de la prelegoj, ĉar se oni publikigas ilin, oni ja ne bezonas elsendi ilin. Tion ankaŭ ne faras iu nacia radio-revuo. La enhavo de tia revuo devus esti la anonco de venontaj elsendoj - kio signifus oftan kaj rapidan eldonadon de tia revuo-, bildoj de tio kion oni ne povas diri parole, do kompletigo de la elsendoj - kaj antaŭ ĉio kritikoj kaj leteroj de aŭskultantoj.

Mi povas tre bone imagi tian revuon kaj mi eĉ opinias ke tio, kion jam delonge faras s-ro Pickel en Pilo-Press, jam estas tia revuo en nukso. Sed jen alia demando: ĉu la merkato de la Esperanto-publiko estas sufiĉe granda por subteni tian revuon? Bedaŭrinde mi estas certa, ke ĝi ne sufiĉas. Iu fakulo pri gazetoj iam diris ke la historio de la gazetaro estas unu granda tombejo de mortintaj gazetoj. Tiu vorto eĉ pli valoras pri Esperantujo. Enorma estus la katalogo kiun eble iam iu

preparos pri la mortintaj Esperanto-gazetoj. Ne estas necese enterigi en tiu tombejo ankaŭ radio-revuon. Do certe estas pli bone se s-ro Pickel daŭrigas sur la ĝisnuna vojo, kaj por lia Eŭropa Esperanto-Revuo estus riĉigo kaj valorigo se li tie publikigus regule unu aŭ du paĝojn kun la skizita enhavo.

Oni devas konsideri ankoraŭ unu plian faktoron: ĉiuj fakaj revuoj en Esperanto kun eble du-tri esceptoj estas mizeraj folioj, ĉar tutsimple ne ekzistas sufiĉe da anoj de la koncerna fako, kiuj povas subteni ĝin.

Permesu al mi diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri la esperantista gazetaro ĝenerale. La plej gravaj organoj kiujn ni havas estas "Esperanto" de UEA kaj "Heroldo". "Esperanto" estas la oficiala organo de UEA, do ĝi ludas kvazaŭ la rolon de registara trumpeto, kaj tio estas tute en ordo. UEA bezonas nepre ilon por klarigi siajn agojn kaj politikon. Koresponde la alia grava gazeto, nome "Heroldo", devus certgrade ludi la rolon de la opozicio, ĝi devu doni lokon al la kritikaj voĉoj, laŭ mia opinio ĝi plenumas tiun rolon nur parte. Mi komprenas ke ĝi ne volas polemiki, ĉar tio nur kondukas al malpaco, sed oni povas ankaŭ kritiki tute seke en maniero kiu estas utila al la kritikito, sed bedaŭrinde ni ne havas tradicion por tio en Esperantujo.

Nun ankoraŭ alia rimarko pri la naciaj Esperanto-informiloj. En Heroldo antaŭ nelonge denove estis prezentita la ideo, ke oni kunfandu ilin en tia maniero ke oni havus ĝeneralan parton komunan por ĉiuj eldonoj dum al la naciaj societoj estus disponigitaj unu aŭ kelkaj paĝoj. Oni konas la sistemon en multaj landoj, kie la ĉiutagaĵ gazetoj faras diversajn eldonojn por diversaj regionoj. Sur internacia kampo tio estas tre malfacila. Mi mem partoprenis redaktante Svisan Esperon en eksperimento, ĝi daŭris kelkajn jarojn. Ni havis komunan eldonon kun Nederlando kaj Belgujo, sed la afero montriĝis tro komplika kaj oni praktike nenion ŝparis pro la alta afranko. Ni devis ĉesigi ĝin.

Montriĝis ankaŭ kiel malavantaĝo ke ne estis eble publikigi nacilingvajn artikolojn frontpage, kio estas nepre necesa, ĉar la naciaj revuoj devas ankaŭ atingi la ĝeneralan publikon de la koncernaĵ landoj. Do la ideo pri kunfandiĝo malgraŭ ĝia ŝajna evidenteco en la praktiko ne funkcias."

#### Opinio de Emiliĵa Lapenna, Radio Zagreb

Zagreb (pp) - Ankaŭ s-ino Emiliĵa Lapenna, redaktorino de la Esperanto-elsendoj de Radio Zagreb esprimis sian opinion pri la problemo de Esperanto-Radio-Revuo kaj respondis al la du demandoj publikigitaj en la bulteno 1/77 "Esperanto en Radio".

Ŝi skribis en letero de la 14-a de junio 1977: "Mi persone gratulas al Vi kaj dankas pro Via konstanta atento donita al Esperantlingvaj radio-elsendoj kaj nun ankaŭ pro la aperigita "Esperanto en Radio".

Samtempe mi respondas al la du demandoj aperintaj en Radio-Bulteno 1/77.

1) Ĉu speciala konstanta rubriko "Esperanto en Radio" en EER provizore povus realigi la ideon de radio-revuo: EER havas pli vastan legantaron kaj RADIO-REVUO devus batali por sia renomiĝo. Pro tio JES!

2) Ĉu la legantoj kaj aŭskultantoj akceptas politikajn tekstojn ktp.:

JES. "

#### Intervjuoj kun Giorgio Silfer

Svisa Kurtonda Radio komencis serion da intervjuoj kun Giorgio Silfer, redaktoro de la literatura revuo "LITERATURA FOIRO"; intervjuas Claude Gacond. De la 21-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1977 Giorgio Silfer lekcias kadre de "Internacia FERIA Altlernejo" pri "Enkonduko al Literatura Kritiko". Kursejo estos Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds en la kreata gastejo Edmond Privat. Tie haveblas ankaŭ pliaj informoj.

### Kaj tamen Varsovio gastigis Vienon...

Romo/Varsovio/Vieno (pp) - El la ampleksa analizo de d-ro Antonio De Salvo pri Esperanto en Radio ni citas: "Antaŭ kelkaj semajnoj, aŭskultanto de Radio Roma skribis: 'Devus fondiĝi Mondfederacio de Esperanto-Radioj kun centra ĵurnalo aŭ programkajero. De tempo al tempo estu programŝanĝo inter Radioj. Ĉi tiel, se oni ne povas aŭskulti interesan programon de iu elsendilo, tion povus ripeti tiu Radio, kiu estas pli bone aŭskultebla'. Ĉi tiu deziro fontas, evidente, el manko de realeco: la stacioj pli bone aŭdeblaj neniam gastigos alies programojn, ĉar kompreneble ili preferas ekspluati siajn instalaĵojn por disvastigi siajn mondperceptojn: ĉu estas realece pensi, ekzemple, ke Vatikana Radio helpu Pekinon, aŭ ke Varsovio funkciu kiel ripetilo de Romo?"

Certe, principe oni devas konsenti al la realeca prijuĝo de d-ro Antonio De Salvo. Tamen Varsovio demonstris en sia Esperanto-Ekspresso de la 17-a/18-a de julio ke regas ankaŭ esperantista solidareco inter la stacioj elsendantaj en Esperanto, almenaŭ inter Radio Varsovio kaj Radio Vieno, kaj ke praktike povas okazi, kion De Salvo opinias ne ebla.

Se hazarde aŭskultanto enŝaltis pasintan dimanĉon la Varsovain programon nur post la komenciĝo, li estus povinta konfuziĝi. Kion li aŭdis, tio ne estis la kutima konata Varsovia programo, sed simple la Esperanto-elsendo de la aŭstria ORF-Vieno kun ĉiuj detaloj: la voksigno de la stacio, la konataj voĉoj de d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal, kun la semajna komentario de d-ro Alfred Macher pri la nord-suda dialogo, raporto pri la Esperanto-tagoj en Sopron kaj la Viena Leterkesto. Temis pri la kompleta dekminuta programo de Vieno de la 4-a/5-a de junio 1977.

Certe unu hirundo ne jam faras someron, tamen tiu hirundo el Varsovio estis malgranda sensacio kaj pruvas ke neniu regulo estas absoluta!

### Islando aktualis en la Vienaj elsendoj

Vieno (pp) - La Kurtondaj elsendoj de la 16-a/17-a de julio dissendis la lastan artikolon en la serio pri Islando. Oni prezentis kelkajn specimenajn alineojn el la islanda novelo "Junulo kaj Junulino", kiu datas de la mezo de la pasinta jarcento. Legis Maria Ohrenberger kaj Emil Vokal. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher, laŭlegita de d-ro Karl Beckmann kaj Emil Vokal, denove traktis pri la homaj rajtoj kaj la Beograda konferenco, pri la rezisto de la aŭstria popolo kontraŭ la ekfunkcigo de la novkonstruita atomenergiero kaj kontraŭ la demetado de la atomrubaĵoj en la propra lando.

En la jaŭda mezonda elsendo post germanlingvaj informoj oni povis aŭdi interesan raporton en Esperanto pri "Islanda Vespero" en Vieno.

### Aliaj stacioj

Pekino kun aktuala raporto pri eksigo de la "kvaropa bando" el la kompartio, Zagrebo, Vatikano kaj IBRA-Radio estis sufiĉe bone aŭdebla. Radio Roma parolis pri internacia kunlaboro en la tekniko kaj citis Bajne el la analizo de d-ro De Salvo. Cetere, nun denove parolas la tekston d-ro Antonio De Salvo mem, kelkfoje helpata de junulo.

### Opinioj de legantoj

Bonveninda estas la 7-paĝa analizo pri la Esperanto-elsendoj fare de D-ro Antonio De Salvo. Tragik-komike estas la fakto ke ankoraŭ troviĝas esperantistoj kiuj ne komprenas ke Esperanto havas same naturan rolon, funkcion kiel aliaj lingvoj. Ni ja havas pli ol sufiĉe da komunikorganoj inter esperantistoj kiuj trumpetas pri Esperanto. Do, ni finfine taksu kun ĝojo ke oni povas, kaj volas, uzi Esperanton por kiu ajn celo; tia maniere lingvo vere vivas.

Bertil Englund

### Esperanto 90-jara

La 26-an de julio 1887 aperis la 1-a lernolibro de Esperanto. Esperanto do estas 90-jara. Tiu dato certe estas bona okazo mediti pri la pasinteco, estantece kaj rigardi en la estontecon. Ĉi tie ni ne volas fari tion, estas tro multe da aspektoj.

Sed pri unu problemo ni volas paroli. Estas problemo kiu aktualas ekde la komenco de Esperanto. Temas pri la lingvoscio de la esperantistoj, pri la lingva perfektigo. Absoluta perfekteco ne ekzistas, sed ĉiu esperantisto devas klopodi atingi relativan perfektecon, fluan parolkapablon. Flue parolata lingvo estas la plej bona propagandilo por Esperanto. Ne sufiĉas ke elito regas Esperanton, la tuta Esperanta popolo devas regi kaj paroli la lingvon. Tiam vivas Esperanto kaj la radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto, havas amason da aŭskultantoj, kaj Esperanto konkeros la amasmediojn.

### Salutvortoj por la SAT-Kongreso

Augsburg (pp) - La ĉefministro de Bavario, d-ro h.c. Alfons Goppel, kaj la ĉefurbestro de Augsburg, Hans Breuer, dediĉis al la 50-a SAT-kongreso, kiu okazos de la 30.7. ĝis la 5.8.77 en Augsburg, skribajn salutvortojn, kies kompletan tekston en Esperanto-traduko ni publikigos en la venonta numero de PP.

El la salutvorto de la bavara ĉefministro, la frato de la mortinta esperantisto Ludwig Goppel, ni citas la finan frazon:

"Mi deziras al ĝiaj partoprenantoj sukceson en la klopodo pri lingva kaj spirita interkompreniĝo kaj la optimistan volon akceli kaj akiri pacon kaj liberecon kaj por nia malnova Eŭropo venkan esperon en la transformo de ilia lingvo-idealo: Esperanto!"

### Libro de la Semajno

Pri Internacia Lingvo - Dum jarcentoj, Isaj Dratwer, 2-a eldono 1977, pliampleksigita kaj aktualigita kolekto de opinioj kaj eldiroj pri la problemoj de internacia lingvo kaj de Esperanto 14,5 x 21,5 cm, broŝ., 320 p., prezo 31,80 GM

### Nova foto-represo de Iltis

Iltis Saarbrücken eldonis foto-represe la amrakonton de la hungara verkisto Gyula Torók "Rozinjo" en la Esperanto-traduko de K. Kaloscay. Formato 13,5 x 19,2 cm, broŝ., 39 p., prezo 5,70 GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

### Pekinaj katalogoj

Pekino (pp) - Guozi Shudian, Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj, eldonis katalogon de Verkoj de Maŭ Zedong kaj katalogon de aliaj ĉinaj eldonaĵoj en Esperanto. Interesuloj petu ekzemplerojn de Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, 8500 Nürnberg 1.

### Esperantujo kun filatelaĵo

Cavalcaselle (pp) - Proksime de Verono situas "Esperantujo" kiu eldonis propran "poŝtmarkon" kun la portreto de Zamenhof kaj la surskribo 1 Stelo kaj Esperantujo. Por la nuligo de la marko oni uzas apartan stampon kun la surskribo "Esperantujo, la loknomo Kavalkaselle kaj la dato.

1 marko kostas 50 liroj, folio kun 30 markoj kostas 1000 lirojn.

Adreso: S-ro Vandelli Giorgio ĉe "Esperantujo", I-37010 Cavalcaselle, Italio.

\*\*\*\*\*

Halo! Halo!

Ankaŭ mi estas por moralo!

(Sed pro kelkaj kialoj...)

Epigramo de

Jan Klínek